BUCKHAVEN METHIL
8 APR 1966
LEVEN FIFE

BUCKHAVEN METHIL
FOR
NATIONAL EXPANSION

Esperanto

EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA

Ĉion por la Redaktoro sendu al:
TOM FRASER,
2 Lady Helen Street,
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:
F-ino ANNE EYRE,
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,
Hamilton, Lanarkshire.

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 62 Printempo 1966 Jarabono, 3 ŝil. (6 steloj)

Nia 61a JarKongreso okazos en Gean House, Alloa, Clackmannanshire, de vendredo la 3a de Junio ĝis lundo la 6a. Jam devus esti en la manoj de ĉiu ebla partoprenonto la tuta aliĝilo kaj programo. La Organiza Komitato esperas je multnombra kaj frua aliĝo. Siatempe ĝi faras ĉion por interesa, ĝuinda kaj digna kongreso kiu helpos antaŭenigi la Aferon en Skotlando kaj plientusiasmigi niajn anojn.

Unu kongreso neeviteble similas aliajn sed ĉiam oni strebas, ke iu aparta eco distingu ĉiun - ni pensas pri la 58a en Glasgovo kiam ludis por ni la "Muzika Espero-Junuleta Rondo" en la bela Palace of Arts; pri la Stirlinga kiam profesia kantisto bonege voĉigis la altnivelan tradukon de F-ino Caw, "Sonoru, ĉiu Sfer' "; pri la 57a en Leven kiam la subteno de la Leven-magistrato estis aparte forta kaj kuriĝiga; pri iu Edinburga kiam la urbestro, je la luksa akcepto en City Chambers, rakontis al ni aferojn el la historio de Esperanto en Skotlando, kiujn ni ĝis tiam ne sciis(kompreneble la instrua influo de la Edinburga Kongres-Komitato ebligis tion! sed la efiko je ni estis alte edifa kaj memorgravura). Povas esti, ke la venonta distingiĝos kiel "la Auld-a", ĉar nia mondfama poeto figuros grave en nia programo, ne nur kiel preleganto pri literaturo sed per disponigo de sonfilmprojekciilo kiun li mem funkciigos por nia plezuro kaj instruo. Ni esperas, ke kvankam tre verŝajne validas la sankta diro ke, "Profeto ne estas senhonora krom en sia patrujo kaj en sia domo" (pro la ne-esperantisteco de Alloa) tamen inter skotaj esperantistoj ĝi ne validas. Sed - ĉu ĉiu skota samideano scias ĝuste kiom laboras por nia Afero, William Auld?, scias eks. ke lastatempe "Esperanto" enhavis 5-paĝan artikolon, "La Esperanta Originala Literaturo 1955 - 65"; ke "Monda Kulturo" portis longan disertacion pri "Hamleto" indan preni lokon inter la plej erudiciaj iu-ajn-lingvaj Ŝekspirologiaj studoj; brilan tradukon de moderna angla verko de Nellie Dunn; kaj energian leteron al la redaktoro replike al recenzo; dum la februara numero de "The British Esperantist" enhavas <u>sep</u> bonegajn tradukojn de irlandaj kaj skotaj kantoj ?

Rilate la filmojn, ankoraŭ flagretas espero, ke la unua pure esperanta, belarta parolfilmo, "Angoroj", atingos nin sufiĉe frue por esti montrita en Gean House, sed manke de ĝi ni jam certe havos:- Spuroj de la Historio; Jen Aŭstralio; kaj alia(j)n. Do la vetero estu kia ajn, vi havos abundon por fari ĉe la 61a, ĉar krom dumsidaj cerboekzercaj aktivaĵoj, ni havos sportturniron por trovi ĉampionojn tablotenisan, kroket-, golfet-, kaj ali-ludan.

Ĉiu venu preta por kontribui al la amuzvespero, venu por subteni la Aferon, venu por enstokigi memorojn, venu por plezuro, aŭ tutsimple venu, venu !
Aliĝiloj jam eliris laŭ la kutimaj vojoj, sed skribu al la Sekretario se bezone, ĉe 9, Howard Crescent, Dunfermline, Fife.

NEKROLOGOJ:

FRAŬLINO JANET CAW, M.A.

Edinburgo perdis sian plej malnovan esperantiston je la 22a de januaro kiam Janet Caw mortis en edinburga flegejo je la aĝo de 83 jaroj. Ŝi aliĝis al la Societo jam en 1918 kaj, simile al sia patro, fidele servis la movadon ĝis pro maljuneco ŝi devis ĉesigi sian laboron. Dum multaj jaroj ŝi kompetente gvidis kursojn en la lingvo kaj longan tempon ŝi estis vigla membro de la konsilantaro.

Ŝian kapablecon pri traduko atestas naŭ skotaj kantoj en la "Kantaro", nome, Bonnie Dundee; Cam Ye by Athol; Caller Herrin'; The Bluebells of Scotland; The Auld Hoose; Mary of Argyle; The March of the Cameron Men; Wae's Me for Prince Charlie; kaj Auld Robin Gray.

SONORU, ĈIU SFER'

Sonoru, ĉiu sfer',
Nin benu sur la ter',
  Se havas tian povon via beno;
Moviĝu via son',
Arĝenta dolĉa ton',
  Kaj akompanu ĝin ĉielorgeno;
Kaj per naŭobla harmoni'
Plenigu ĥoron de l' anĝela simfoni'.

Se tia melodi'
Plektiĝus inter ni
  Denove venos la Epoko Ora;
Vaneco kun makul',
El ĉiu ajn angul',
  Fandiĝos for, kun Peko malbonkora;
Eĉ la Infero pasos for,
Lasante siajn domojn al tagiĝa glor'.

Justeco kaj la Ver'
Revenos al la ter',
  Kun ĉielarko; malgraŭ niaj duboj
Kompato, dolĉa don'
De la eterna tron'
  Belege brilos tra teksitaj nuboj;
Ĉielo, kiel ĉe festen',
Malfermos siajn pordojn al la glora scen'.

John Milton 1608 - 1674
Tradukis Janet Caw. 1883 - 1966

Kompreneble Janet Caw tradukis multon kiu ne aperis en la "Kantaro". La ĉi supran ŝi tradukis speciale por la 42a Kongreso en Stirlingo. La Kongres-Komitato tion petis, kaj en la diservo en la Preĝejo de la Sankta Kruco kantis la himnotradukon sperta kantisto. La efiko estis impona kaj emociiga kaj lasis neforgeseblan impreson.

ISOBEL COCHRANE : En 1927, Skota Kongreso okazis en Dunfermlino, kaj ĉe la Diservo en la histori-riĉa abatejo ĉeestis junulino kiu kutimis kanti en tiu preĝeja ĥoro. Ŝi tiom interesiĝis pri Esperanto je tiu okazo, ke ŝi komencis lerni kaj poste instrui la lingvon. F-ino Cochrane ofte partoprenis en kaj skotaj kaj universalaj kongresoj kaj havis 'verdajn' amikojn en pluraj landoj. Hejmlande, ŝi estis ano de la Edinburga Societo kaj de Fife-Stud-Rondo kaj ĉi ties Strathkinness-Semajnfino. Ŝi malsanis dum la lastaj jaroj, kaj ŝia forpaso je la 10a de decembro 1965 lasas al ni nur memorojn pri ŝia ĝentila, kvieta kaj fidela sintenado.

M.C.F.

ANDREW MORTON : Ŝercema kaj bonhumora ĝis la fino, S-ro Morton restis fidela al la Grupo en Buckhaven kaj Methil de ĝia fondiĝo. Efektive li mortis je la 34a datreveno de la unua Grupkunveno kiu okazis la 22an de decembro 1931. Dum multaj jaroj, mem diplomito kun honoro, li instruis la klason ĉiam kun bonhumoro tamen nepre kun zorgo kaj precizo. En gajaj rondoj li ĝojis kanti per bela tenora voĉo la esperantajn kantojn kaj lastatempe li kantis "Lago Lomond" por sonbendo sendita al Trelleborg, nia ĝemelurbo. La grupanoj kaj ĉiuj skotaj esperantistoj alte estimis kaj amis lin, kaj lia memoro restos freŝa en ĉies koroj.

P.C.S.

La STUDENTA SCIENCA RONDO DE ESPERANTISTOJ de Torun (Pollando) organizas sian 2an Internacian Esperanto-Seminarion inter 13a - 17a de aprilo en Torun. Ĝin morale kaj finance apogas la Altlerneja Konsilantaro de Unuiĝo de Polaj Studentoj en Torun per 20,000 Steloj (£500). La partoprenontoj lernos pri la vivo de N. Kopernik, pri la sammoma Universitato, pri Esperanto en la sciencoj, pri studenta agado dum JIK, kaj interŝanĝos spertojn, ktp. ktp. La Rondo okazigas konkurson kies partoprenantoj sendas referaton "Esperanto en Scienco", ĝis 15/3/66. La ensenditaj studaĵoj servas kiel diskut-gvidiloj. Dum la Rondo-tempo okazos oratora konkurso pri la temo "Nikolao Kopernik".

La JUNULARA SEKCIO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO kunlaboras kun STELO kaj TEJO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo kaj Tutmonda Esp. Junulara Organizo), organizas kaj kunordigas la enlandan junularan Esperanto-agadon, kaj la abonadon de KONTAKTO kaj aliaj Esperanto-gazetoj. Ĝi petas ke oni notu ĝian adreson :- Junulara Sekcio de ĈSEK, PRAHA 2, Blanicka 4, Ĉeĥoslovakio.

La 19a KONFERENCO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO okazas ĉi jare en Debrecen (Hungarujo) de la 23a - 29a de julio. Ĝia ĝenerala temo estos "Por la unueco de la homaro" dividita en tri partojn, ekz., (2) Detruaj fortoj - resanigaj fortoj, rasoj, religioj, lingvoj, sociaj ordoj, tekniko. La programo ampleksos ekskursojn, artajn kaj kulturajn aranĝojn. La inkluziva kosto estos 388 Steloj (£9. 14/-). Plian informon donas :- F-ino Tini Putto, Schaapsweg 139, EDE (Gld) Nederlando.

LA HISTORIO DE LA PORCELANA SALIKO-BILDO.

En la dek-sesa jarcento aventuremaj Nederlandanoj ŝipveturis ĝis Azio, eltrovis novajn landojn kaj vizitis Ĉinujon. Multe surprizis la maristojn trovi, ke la ĉinoj estas tre spertaj pri multaj metioj, precipe pri la farado de porcelano kiu estis belege kolorigita laŭ la salika desegno. Nuntempe la blua kaj blanka koloroj estas mondfamaj.

Mi memorigu vin pri la bildo :- Meze serpentumas rivero kiu apartigas la bienon de riĉa, ĉina nobelo, efektive mandareno, de insulo sur kiu staras la malriĉa, malgranda domo en kiu Ĉang kaj la patrino loĝas. Ĉang, juna, belaspekta, laborema, estas ĝardenisto, kiu tre lerte prizorgas la bienon de la riĉa mandareno. Lia patrino nutras silkraŭpojn kaj ŝpinas silkon por gajni vivrimedojn. Dekstre estas la domego de la riĉulo; maldekstre la domo de la malriĉulo; meze la rivero kun ponto. Sur la ponto oni povas vidi tri personojn. La unua estas la bela filino de la mandareno, Ĉaj-laj, la dua, Ĉang, kaj la tria estas la mandareno mem. Dekstre estas morusarbo kies foliojn la silkraŭpoj manĝas. Supre estas du turtoj interplektante la bekojn, simbolo de ĉiama amo. Apud la ponto kreskas arbo kies branĉoj malleviĝas preskaŭ en la akvon. La turtoj, laŭlegende, ĉiujare faras la neston en tiu arbo kiu estas babilona saliko. En la antaŭo zigzagas bambua barilo trans kiu neniu povas vidi kio okazas en la bieno.

La riĉega mandareno jam decidis, ke la bela filino edziniĝu kun maljuna, malbonaspekta riĉulo. Ĉaj-laj, tre malfeliĉa, rifuzas konsenti. La patro internigas ŝin en la bela domego kie Ĉaj-laj havas multe da juveloj, multe da servistoj por atenti ŝin, multe da robistoj por fari novajn vestojn, sed ŝi ne havas liberecon. Oni tute ne permesas, ke ŝi forlasu la domegon. Unu tagon, rigardante el la fenestro, ŝi ekvidas Ĉang-on, kiu delonge amis ŝin, sed, kiu, pro malriĉeco, ne povis anonci la amon. Ŝi - faligas bombonon ĉe liaj piedoj. Li deŝiras la plej belan rozon, ĵetas ĝin tra la fenestron de Ĉaj-laj. Baldaŭ Ĉaj-laj kaj Ĉang reciproke enamiĝas, daŭre renkontiĝas, ĝis kiam la patro eltrovas la sekreton. Li forpelas Ĉang-on malpermesante lin iam reeniri la bienon. Tre malfeliĉe Ĉang hejmeniras. La patrino konsolas kaj instigas lin, "Se vi vere amas la belulinon, Ĉaj-laj-on, kuraĝu, kuraĝu ! Iru kaj edziĝu kun ŝi !" Fine, li sendas leteron trans la riveron en eta boato, efektive en kokusŝelo. Servistino portas la komunikaĵon al Ĉaj-laj, kiu kore respondas. Ili daŭre sendas leterojn ĝis kiam ili jam aranĝis kune forkuri. Unu nokton ili renkontiĝas sub la belaj rozarbetoj. Ĉio estas bone aranĝita, sed bedaŭrinde la patro ekvidas la forkurantojn kiuj jam atingis la ponton. La patro sekvas, renkontas ilin sur la ponto, kaj tie li ĝismorte batas la junulon, kiu falas en la akvon kaj dronas. La malfeliĉa junulino ĵetas sin ankaŭ en la riveron kaj dronas.

Samloke ekkreskis malfeliĉaspekta arbo - la babilona siliko, inter kies branĉoj la turtoj ĉiujare faras la neston. Tuj post la droniĝo flugis el sub la ponto la du turtoj, kiuj estas nun, laŭ la legendo, la geamantoj.

Mgt. Jackson

NIA AFERO ANTAŬ LA PUBLIKO

La Hungara Esperanta Asocio faris laŭdindan iniciativon per la sendigo de PUBLIKA LETERO aperinta en "Nepszava" (Voĉo de Popolo), grava Hungara ĵurnalo, al la Internacia Olimpia Komitato. La letero amplekse priskribas la bezonon por internacia lingvo en la sport-mondo ĝenerale kaj ĉe la Olimpiaj Ludoj speciale kaj petas, ke Olimpia Komitato akcelu, ke dum la internaciaj sportaj renkontiĝoj, Esperanto estu akceptata kiel oficiala lingvo. La leteron subskribis 24 sportistoj inkluzive plurajn mond-ĉampionojn. La Hungara Asocio vokas al esperantistoj diskonigu kaj apogu ĉi tiun leteron inter sportistoj, helpu al ili lerni la lingvon, skribu al nacilingvaj sport-gazetoj kaj skrib(ig)u al la Olimpia Komitato. En la esperantaj radiodissendoj (ĉiuvespere je nia 8:30 vespere, per ondo 48,1 metroj kaj aliaj) ni jam kelkfoje aŭdis ankaŭ pri ĉi tio.

(Aferoplena raportisto nia, sukcesas kapti sufiĉan tempon ĉeesti konferencon pri :-)

LIBERA TEMPO

Je la 19a de februaro fako de Edinburga Universitato invitis vizitantojn al konferenco pri libera tempo. Profesoro Burns, sociologo en la Universitato, parolis unue. Li diris, ke en pli frua tempo la ordinara homo pasigis siajn liberajn horojn - kiuj estis pli malmultaj ol niatempe - en la sama loko kie li laboris, sed nun estas apartaj lokoj en urbegoj por laborejoj, domoj kaj plezurejoj. En lastatempaj jardekoj la homo multe pli ol antaŭe fariĝis individua. Li sentas sin pli libera sekvi siajn proprajn inklinojn. Tiuj inklinoj estas influataj de la ĵurnalo, la kinejo, kaj la televido, de kiuj oni emas elekti siajn proprajn "sekvindulojn", ĉu sportistojn, filmstelulojn, muzikistojn aŭ politikistojn. Dum jarcentoj la homo strebis por liberigi sin de laboro kaj nun li timas sian liberan tempon.

S-ro Jones, ĉefo de la Urba Literatura Instituto, Londono, diris, ke ni estas mezvoje inter la vivstato, kiun ni heredis de niaj prapatroj, kaj vivstato en kiu ni havas pli da libera tempo ol ni povas plenigi. Ankaŭ li opiniis, ke la homo timas tiun liberan tempon. "Kian edukon bezonas raso de liberaj homoj?", li demandis. Li respondis, ke ĝi bezonas "endomajn publikajn parkojn", tio estas, grandaj konstruaĵoj meze de la urbo, kie oni povas satigi sian inklinon, ĉu por sporto ĉu por flankokupo - estu vasta sortimento da iloj - ĉu por temo pli intelekta.

Poste parolis S-ro Carus. Li estis antaŭ nelonge elektita gvidanto de nova projekto de la Edinburga Eduka Aŭtoritato por plenaĝuloj. Lia tasko estas varbi kaj prepari instruistojn por la diversaj interesoj de tiuj, kiuj deziras utile pasigi sian liberan tempon, kaj li disponas pri sep ĉambroj en Riddle's Court uzeblaj por kursoj kaj organizaĵoj. S-ro Carus opiniis, ke tempo proksimiĝas, kiam plenaĝula edukado rajtos unuavican atenton. Signoj estas videblaj, ke ĝi estos bezonata por ĉiuj aĝgrupoj. Unu el liaj plej urĝaj deziroj estas lingvaj laborejoj por satigi la bezonojn de la proksima generacio. Oni ne povas nun prognosi kun certeco, kiu temo estos populara post tri jaroj. Gvidlibro pri temoj instruataj estos baldaŭ disdonita al lernejanoj je ilia fina jaro kaj estas eble, ke simila libro por plenaĝuloj sekvos.

La /

La restanta tempo de la konferenco okupiĝis per diskutado, sed tiu tempo estis tro mallonga. Mi bedaŭras tion ĉar la malmultaj minutoj da diskutado estis por mi pli ĉeltrafaj ol la formalaj paroladoj. Mi sukcesis enigi la fakton, ke malgraŭ la diro de unu el la parolintoj, ke la Edinburga Magistrato subtenas ne-oficialajn organizaĵojn, ĝi tamen sen ia signo de bedaŭro, elpelis la Edinburgan Esperantan Societon el la ĉambro en Synod-Halo, kiun ĝi okupis dum preskaŭ 60 jaroj.

R. Mackay

THE CULTURAL VALUE OF ESPERANTO, 5 paĝa apologio por nia lingvo de la literatura vidpunkto, celas konvinki, ke Esperanto rajtas esti instruata en ĉiugradaj britaj lernejoj. La broŝureto (represaĵo el "Modern Languages" December 1965) estas direktita al ne-esperantistaj skeptikuloj, sed ĉiu esperantisto legu ĝin - li lernos el ĝi kaj lia fido kaj fiero pri la genia kreaĵo de Zamenhof estos forte renovigita. Ĝin distribuas (senpage ?) British Esperanto Assocn., 140 Holland Park Ave., London, W.11, kaj Society of British Esperantist Teachers, 2, Hazel Grove, HARTWOOD PARK, Chorley, Lancashire. Sube sekvas kelkaj postlegaj pensoj de S-ano Joseph Fettes :-

Kial nomu Esperanton artefarita ? Ĝi ja enhavas vortojn el diversaj lingvoj sed ĉu ne ankaŭ la angla ? Kiel do ĝi estas aparte arte farita ? Ĉu per la gramatiko - tiel regula, ke tiuj studintaj ĝin nur du jarojn povas legi flue kaj iel facile paroli. La plejmulto povas kompreni kaj regi la esperantan gramatikon; nur la kleraj povas tion ĉe sia nacia lingvo - el fremduloj nur tiaj kun aparta lingva talento. Aŭdo kaj lego de la angla el ordinaruloj montras, ke ĝusta lingvouzo estas nek ennaskita nek facile akirebla. Ĉiu gramatiko estas artefarita. Mi lernetis kelkajn naciajn lingvojn sed spertis grandan malfacilon ĉe interkompreniĝo, sed post nur unu jaro da studado mi kongresis ĉe Hago kaj interamikiĝis kun kelkaj, inkluzive du finnojn kies lingvon mi tute ne konas, tamen mi povis interpreti por ili en nederlanda hotelo. Post la dua studjaro, mi estis en Elsinore estante la ununura anglalingva esperantisto, tamen mi estis parolanta ano de la familio ! Multan sperton pri Esperanto-instruado mi ne havas, sed trafas min la entuziasmo de la infanoj. La facileco de la lingvo veras por la unuaj paĝoj, sed ni ne troigu. Poste malfacilaĵoj aperas, kiel mi mem spertis, je kio iuj rezignas "trompite". Por traduki "taciturn fellow" (malparolemulo) mi devis tre pensi, kaj nur de Auld mi konatiĝis kun la esprimo, "ĉiesulino" por "harlot".

Mi ne posedas unu el la libroj nomitaj en la broŝuro, sed mi ŝate legis svedan kaj danan antologiojn; "La Faraono"; "Kiel Akvo de l' Rivero"; dum "Logiko" de Martinus malfermis novan mondon por mi. Aliaj libroj interesintaj min estas "Nia Historio" (Hoog); "Vivo de Zamenhof" (Privat); "Skizo de Ekonomia Geografio" (Horrabin); kaj "Konciza Geografio de Ĉinio"(Judi). Iu proponis. ke Esperanto estu nomita ne la "internacia lingvo" sed la "komuna lingvo". Ĝi fariĝus komuna se oni instruus ĝin en ĉiuj lernejoj. Ĝian utilon por interpopola kompreniĝo oni ne povas tro taksi. Ĝia valoro kiel mensvastigilo rilate aprezon de pensado kaj vivado de "fremduloj" estas nedubebla. Esperanto estas uzebla kaj uzenda: ke ĝi ne estas moda por snoboj same malgravas kiel snoboj mem.

(Resume el la angla originalo)

LA TEKSUMISTO estas nova Internacia Revuo por ĉiuj branĉoj de la teksuma industrio inkluzive ŝpin- teks- drap- tinktur- kaj purig- istajn. N-ro 1 estas 5 folioj hektografitaj unuflanke, grandparte dediĉitaj al fakterminoj: 5 numeroj esperataj sed ne promesataj, ĉiujare. Redaktas Manfred Fuhrer, Poŝtfako 153, CH - 4900, Langenthal, Svisio. Brita Peranto, S-ro Bruno Najbaro, 2, Mackingstone Drive, Oakworth, nr. Keighley, Yorkshire, al kiu sendu la jarabonon, 8ŝ.7p. (17,2 Steloj). Pro sia vasta temaro la nova gazeto povus utili al multaj tiufakaj esperantistoj se ĝi sukcesos eviti troan teknikecon pri la unuopaj branĉoj de la industrio.

TANEF (Turista Asocio la Naturamikoj, Esperanta Fako) informas pri si. Ĝi estas unu el la nemultaj esperanto-fakoj kies patra asocio ne estas por-esperanta organizaĵo. Ĉi tiu, la Naturamika Internacio, havas 365 mil membrojn kaj posedas 765 domojn kaj kabanojn en 16 landoj. La esperanta fako fondiĝis en Montevideo je 2/3/26 kaj tiam havis 92 anojn kiuj baldaŭ montris sian influon je la entenanta ĉeforganizaĵo. En 1946 la kotizmarkoj de la Internacio ricevis esperantan surskribon, "La Naturamikoj"; en 1951 aperis la esperanto revuo "La Migranto" kaj TANEF-informilo por la kunlaborantoj; en 1956 la fako estis oficiale agnoskita de la Internacio dum ĉi ties kongreso en Hamburg; en 1965 ĉe Kopenhago la alprenita nova statuto deklaris subtenon por Esperanto, kaj eldoniĝis la festbroŝuro "70 Jaroj Naturamikoj" en kvin lingvoj unu el kiuj estis Esperanto. Por festi sian 40an naskiĝjaron TANEF organizos, post la U.K. en Budapesto, Jubilean Kunvenon en Vieno kun ekskurso tra la urbego sekvota de "Rondvojaĝo tra Aŭstrio" de 8 - 13a de aŭgusto. Informon donas: Turista Asocio, "La Naturamikoj", Esperantofako, Diefenbachgasse 36, A-1150, Wien, Aŭstrio.

TEO JUNG: LA ESPERANTA KONJUGACIO. Kun pli ol 1000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verbformoj. Unua parto. 123 inkvartformataj, ĉ. 21 x 27 cm., paĝoj. Dua parto, aperos en la daŭro de la venonta somero aŭ aŭtuno. Prezo por ambaŭ volumoj kune: egalvaloro de ned. gld. 13,50 (3,85 dolaroj - 54 Steloj) plus 10% por sendkostoj. Sola volumo nevendebla. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO, Kastelo "Gresillon", 49 BAUGE, daŭrigas sian valoran servon al Esperantujo igante sin ia Meko kien almenaŭ unu fojon en la vivo ĉiu vera esperantisto en la mondo devas nepre pilgrimi. Ĉi jare ĝi proponas Paskan Kulturan Semajnon, dediĉitan unualoke al la gejunularo, de la ĝis 8-a de aprilo. Ĝin gvidos S-ro Llech-Walter, la Prezidanto de U.F.E., kun partopreno de elstaraj prelegistoj. Dum la somero antaŭ la 4a de julio la Domo akceptas ankaŭ ne-esperantistajn grupojn, je kiu limdato komenciĝas la UNUA PERIODO, 3-a ĝis la 24-a de julio - PREPARADO de tri EKZAMENOJ. La partoprenontoj studos ĉiun labortagon 2½ horojn a.t.m. kaj 1½ horojn p.t.m., kaj, pli distre, partoprenos paroladetojn, ludojn, filmelmontrojn ktp. en la vesperoj, la instrulingvo estante, kompreneble, nur Esperanto. Oni studos la lingvon en la plej vasta senco - ĝian gramatikon, historion, tradukojn kaj kulturon. La kulminaj ekzamenoj okazos sabaton la 23an de julio.

La DUA PERIODO, 24a de julio - 7a de aŭgusto, tre allogas ankaŭ tiujn kiuj tralaboris la UNUAN, ĉar dum ĝi oni kvazaŭ praktikas ĝuste la aferojn kiujn oni studis en la UNUA.

La TRIA PERIODO, 7a - 28a de aŭgusto, ŝajnas kunigi la farojn de la UNUA kaj DUA, krome materiale praktikaj aktivaĵoj estas enkondukitaj. Ni citu,

"antaŭ /

"antaŭ pluraj jaroj la administrantaro, konsiderante ke ĉiuj formoj de komuna laboro kaj distriĝo helpas al la interamikiĝo de la homoj, decidis proponi al la ĉeestantoj iniciadon al bindado de libroj, korbofarado kaj kinoarto. Plie ĉiuj povas ankaŭ komune ludi sur la sportejoj: la infanoj disponas infanludejon: la Kulturdomo prezentas, ofte helpata de la restadantoj, diversajn distraĵojn, paroladetojn, ludojn, dancojn: lumbildojn kaj esperantoparolajn filmojn. Tiuj filmoj estas esperantigitaj en la Domo mem."

La KVARA PERIODO, 28a de aŭgusto ĝis 11a de septembro, estas dediĉita al supera kaj praktika kursoj organizitaj de U.F.E. kaj ŝajne celas pliparte la instruon de Esperanto al francoj, sed ĝi povus esti bonega okazo ankaŭ por ne-francoj esperantistaj iom komprenantaj la francan, done/riceve plibonigi sian regon super ambaŭ lingvoj. Se ni rajtas tion fari, ni menciu du semantikajn aferetojn kiuj ofte tiklas nin kiam ni legas franclingvulajn tekstojn. Jen tipa ekzemplo el la frontpaĝo, ".... okazos vizito de la kasteloj de la Loire" (niaj substrekoj). Al ni, tio kvazaŭ implicas, ke la monto venas al Mahometo ! tio estas, ke la kasteloj de Loire bonvolas fari viziton al la samideanoj en la Domo. Kial, karaj francoj, vi ne skribas, "vizito al la kasteloj de Loire" ? Rilate al la de ni kritikata "la", vi ne dirus, "Nia ĉefurbo estas la Parizo", ĉu ?

Ni memorigu al niaj legantoj, ke nia Prezidanto, S-ro Mee, tiel ĝuis sian restadon en Gresillon, pasintan jaron, ke li pretas organizi karavanon tien ĉi jare. Omnibuso forlasus Glasgovon je 15-7-66 kaj revenus tien je 29-7-66. Interesataj skribu al li ĉe, The Caravan, Home Farm, Motherwell.

RADIO BUDAPEST nun elsendas ĉiutage je 20:30 laŭ Brita Somera Tempo por 15 minutoj, per ondoj 240 m.; 41,6 m.; kaj 48,1 m. Krom informi ĝenerale pri Hungarujo, ĝi regule sciigas pri okazaĵoj en Esperantujo kaj planoj por la U.K. Ni povas konfirmi ricevon ĉe nivelo de klareco kaj aŭdebleco plejofte kontentiga, je la lastcitita ondolongo. Inter alie ni aŭdis, ke la Pola Teatro denove prezentos dum la Budapesta Universala Kongreso, la brile sukcesan dramon "Kataki". Ni varme rekomendas al niaj legantoj aŭskultadi al la novaj dissendoj kies ĉiutageco kaj oportuna horo de elsendo estas granda avantaĝo.

Esperanto estis la kreaĵo de genia idealisto kaj homamanto, sed eĉ la plej severe praktikaj homoj ne povas ne agnoski la grandan utilon kiun alportus ĝia ĝenerala alpreno fare de komerco kaj industrio. Ni citu el n-ro 1, jan/feb. 1966, de OkcidentGermana Revuo, paĝo 6, "En LA SERVO POR LA KONSUMANTO kvar nutraĵkooperativoj el Francujo, Nederlando, Svedujo kaj la Federacia Respubliko Germanujo volas nun komune aĉetadi varojn kaj vendadi ilin sub la kvalitmarko "EL" (Eŭropa Laborkolektivo). Ĉiu nacia kooperativa organizo peros samtempe por la tri aliaj, la varojn en kiuj ĝi havas la plej bonajn merkatan pozicion kaj superrigardon .... Al la nova laborkolektivo apartenas 26,400 podetalaj vendejoj en Francujo, Nederlando kaj la Federacia Respubliko Germanujo kun vendiĝ-sumo 7000*da gm. Tia internacia diverslingva kolektivo bezonas por senĝena kaj glata funkciado facile lerneblan lingvan interkomprenigilon kia estas la Internacia Lingvo. Tion jam ekkonis GEG, Hamburg, Besenbinderhof, pogrande aĉetanta societo de la germanaj konsumadaj kooperativoj. GEG jam eldonis en la Internacia Lingvo varbajn kaj informajn foliojn kaj distribuis ilin ĉe internaciaj kongresoj ....."

(La fluanta tajdo estas nun ĉe ni" !)

* 7000 milionoj

ILASE (INTERNACIA LIGO DE AGRIKULTURAJ SPECIALISTOJ) sendis al ni sian 2/3an numeron de Agrikultura Bulteno, 20 paĝan broŝuron, plenfoliojn, ne tre klare multobligitan. Redaktejo, ul Oboriste 15 - Pestera, Bulgario. La enhavo, kiom ni povas juĝi, estas tre praktika kaj interesos fakulojn, ekz. "Atoma Energio en servo de la agrikulturo", "Plantoj kapablaj adaptiĝi al senakva ekzistado", "Amerikaj fiherboj en Anglio, Belgio kaj Nederlando". La agrikulturaj specialistoj-esperantistoj planas renkontiĝi en Budapesto dum la U.K. Ni volonte sendos ĉi tiun specimenon al iu el niaj legantoj kiu petos ĝin.

LA PETSKRIBA KAMPANJO DAŬROS ĜIS 31a de JULIO ĈI JARE. Oni decidis, ke la kolektado de subskriboj por la granda Peticio al UN daŭru, do kolektintoj ne laciĝu en la bona laboro kaj tiuj kiuj ial ne povis partopreni la laboron antaŭe, ekagu nun. La granda plimulto de ordinaraj homoj volonte subskribas, kaj tute aparte de la efiko je UN kaj UNESKO la kolektado donas tre taŭgan okazon por kvieta sed efika propagando. Skribu al BEA por formuloj kaj informu nin pri la rezulto de via agado ĉar ni tre deziras informi legantojn pri la skota atingo en ĉi tiu laborkampo.

STRATHKINNESS-SEMAJNFINA STUDRONDO okazos ĉi jare 29an de aprilo ĝis 1-a de majo. Ankoraŭ vakas kelkaj lokoj, do forgesemuloj tuj mendu sian lokon al S-ino Fraser, 2, Lady Helen Street, Kirkcaldy, Fife.

POLA RADIO daŭrigas siajn Esperanto-dissendojn kaj organizas stimulajn konkursojn. Bedaŭrinde la detaloj de ĉi tiuj atingis nin post la preparado de nia antaŭa numero kaj nun tro malfruas. Kun plezuro ni refoje atentigas pri la ĉiutagaj elsendoj je 16,30 laŭ Brita Somera Tempo. La plej bona el la multaj ondolongoj, laŭ nia sperto, estas 50,42.

44a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO. Ĉi tiu land-kongreso okazos je Pentekosto de vendredo la 27a de majo ĝis mardo la 31a de majo, 1966. La organizantoj varme bonvenigos ankaŭ esperantistojn de eksterlando, al kiuj ili donas senpagan aliĝon. La Kongresurbo, BAMBERG, estas belega loko kun multaj interesaĵoj kaj vizito al ĝi kaj la Kongreso estus memorinda sperto. Por ĉiaj informoj skribu al :-
44a Germana Esperanto-Kongreso, 8600 Bamberg, Untere Sandstrasse, 4, Federacia Respubliko Germanujo.

KARAVANO al BUDAPESTO. Sub la aŭspicio de la Belga Esperanto-Federacio, S-ro G. Maertens, 51, Pr. Leopold St., 51, St. Kruis, Belgujo, organizas karavanon al Budapesto kiu estas samtempe ĝuinda promeno tra Eŭropo. La aŭtobusoj forlasos kelkajn belgajn urbojn je dimanĉo 24a de julio kaj veturos laŭ Wurzburg, Nurnberg, Plzen, Prago (tuttaga restado tie), Olomouc, la Tatromontaro, Dobsina, Koŝice, kaj plue tra la norda parto de Hungarujo ĝis Budapesto. La aŭtobusoj restos je dispono dum la Kongreso kaj repromenos tra la plej belaj partoj de Aŭstrujo kaj Germanujo alvenonte en Belgujon je sabato la 13a sufiĉe frue por permesi al alilanduloj hejmeniĝi dimanĉe. Por la 15 tagoj la prezo estas 8,000 Fr (edzino kaj familianoj pagas nur 7,000 Fr). La Kongressemajno-kostoj estos fiksitaj laŭ la diversaj deziroj de la partoprenontoj. "Ni ne volas profiti sed krei internacian atmosferon pere de Esperanto kaj doni la eblecon viziti Budapeston laŭ la plej ideala maniero; senzorge, vizitante kaj ĝuante la vojaĝon mem, kontaktante kie ni povas kun la lokaj esperantistoj".

LA AMO ESTAS LA PLEJ BONA NOVAĴO !

Jam dufoje publicistoj prezentis al la skota publiko la geesperantan paron Ges-roj Jack kaj Mia Casey. Tion ni endatempe raportis al niaj legantoj. Nun la redakcio de "Woman", kolore ilustrita gazeto por la sinjorinoj, sendis raportistinon kaj la rezulto de tiu intervjuo en la Casey-hejmo aperis sabate la 12an de marto. La paro estis bildigita plaĉe supre en la paĝo kaj, krom flankaj reklamoj, niaj gesamideanoj okupis la tutan paĝon.

Jack priskribis kiel li renkontis sian estontan edzinon pere de Esperanto ĉe esperanta kongreso kaj alia renkontiĝo esperantista. Legantoj certe ricevus bonan impreson pri la lingvo kiel praktika kaj praktikata interkomprenigilo. Mia priskribis siajn impresojn pri vivo en, por ŝi, la fremda lando Skotlando, kaj neniel nenature aŭ trude reliefiĝis la fakto de la malhelpoj de la lingva barilo.

Kiel kompletigo de la informo liverita de tiu artikolo ĵus atingis nin karto donanta la ĝojan informon kiun ni metas sube -

NASKIĜO Al Ges-roj Jack kaj Mia Casey (antaŭe Zupanic)
je la 17a de Marto filo, KEVIN CASEY.

Gratulon de ĉiuj esperantistoj en Skotlando !

KIEL ESPERANTISTOJ FERIU ?

La bazo de sukcesa ferio estas ŝanĝo; ŝanĝo de loko; ŝanĝo de farado; ŝanĝo de kunuloj, k.t.p. Ĉu do esperantisto tute flankenlasu sian alprenitan lingvon dum sia libertempo ? Emfaze NE ! diras la kongresemulo, kiu profite al si kaj eble eĉ pli profite al la Movado ĉiujare partoprenas la Universalan Kongreson. Tamen laborema oficulo en la loka movado kiu ĉeestas ĉiun kunvenon dum la jaro, aĉetas kaj plenlegas la universalan, landan kaj distriktan presorganon - jes, eĉ "Esperanto en Skotlando" ! - eble sentos bonefikon se li dumtempe forŝiras sin de ĉio esperanta. Eble li revenos refreŝigita kun eĉ pli granda apetito al por-esperanta laboro. Tiaj tamen estas la granda malplimulto. Al ĉiu alia, estas profite ekspluati la lingvon ankaŭ, aŭ precipe ĝuste, dumferie.

Ekzemple, vi povas fari reciproke stimulajn kontaktojn kun esperantistoj en aliaj urboj, ĉu en - ĉu ekster - lande. Ne pensu tamen ke ĉar vi disponas pri multa libera tempo, ĉiu alia ankaŭ situas tiel ! En gastodomoj kaj simile, oni ofte faras neformalajn diskutojn de la "El la ĉapelo" speco. Mankas al multaj homoj kion diri ĉi tia sed esperantisto havas kulturan temon pri kiu li estas bone informita do tre kapabla priparoli. Utiligu tiun informon por la bono de la Movado kaj intereso de viaj kunferiantoj. Ne kaŝu vian lumon sub arbusto !

Serĉas korespondantojn: S-ro Jaques Auguste Courbet, Praia do Flamengo, 254 - Apto. 404 Flamengo - ZC-01 - RIO DE JANEIRO - BG - Brazilo.

Serĉas korespondantojn en angla lingvo (Ĥemia inĝeniero, Dvorak Svatopluk, ul. Wolkerova, (Novy Bor-Ĉeska Lipa, Ĉeĥoslovakio.

Interŝanĝas leterojn, insignojn, gram-diskojn, gazetojn, glumarkoj kaj etikedojn de alumetoj, biero, vino kaj brando, Friedrich Zold (teknikisto). Adreso: Koŝice, ul. Vystavby 1, Ĉeĥoslovakio.

UNIWERSYTET
KUL